I. F. E. A.

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)

ESPERANTO

# Informa Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071 REDAKTORO: Gimelli p. i. Germano

N° 11 - 12 Novembro - Decembro 1962 12-a Jaro

## COMUNICATO

Col Congresso Nazionale della "Itala fervojista Esperanto-Asocio" tenutosi il 19 settembre 1962 a San Benedetto del Tronto, si è aperto il nuovo anno finanziario 1962-63.

Preghiamo vivamente i nostri Soci di versare le quote al più presto. Per agevolare il versamento delle quote sociali si allega al presente bollettino, il bollettino di versamento nel Conto Corrente Postale n° 8/24094 intestato alla "Itala Fervojista Esperanto-Asocio" I.F.E.A. Via Donato Creti n° 61 Bologna (1). Le quote sociali per l'anno 1963 restano

- Associazione alla I.F.E.A., alla I.F.E.F., alla U.E.A., ed alla F.E.I., con abbonamento alla rivista "L'Esperanto": £. 1500 annue.
- Associazione solamente alla I.F.E.A. ed all' I.F.E.F. (per quei soci che pagano le quote di associazione alla F.E.I. el all' U.E.A. direttamente o tramite i Gruppi Esperantisti locali): £. 800 annue.

Si pregano vivamente i Soci che non hanno ancora pagato le quote sociali per l'anno 1962, e che continuano a ricevere il bollettino, di trasmettere con ogni urgenza le quote per l'anno 1962 da noi già versate alle Associazioni di cui siamo aderenti (U.E.A., I.F.E.F., e F.E.I.) oppure trasmettere le loro dimissioni per non dovere pagare le loro quote anche per l'anno 1963 alle suddette Associazioni.

## BONDEZIROJ

OKAZE DE LA PROKSIMAJ FESTOJ, KUN VARMA KORO, LA ESTRARO DE ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO KAJ LA REDAKCIO DE "INFORMA BULTENO-ITALA FERVOJISTO", FRATE BONDEZIRAS FELIĈAN KRISTNASKON KAJ PROSPERAN NOVJARON AL ĈIUJ MEMBROJ KAJ SIMPATIANTOJ DE NIA ASOCIO.

NI SENDAS KORAJN BONDEZIROJN ANKAŬ AL LA ESTRARO DE INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA KAJ AL LA TUTA ANARO KAJ LEGANTARO EN ĈIUJ LANDOJ.

## LA 15-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO - KONGRESO

en Stoke-on-Trent, Britio, inter la 11-a kaj 17-a de majo 1963. Bankkonto ML.12 CWS Bank. Korespondadreso: S-ro Horace Barks, 24 Marsstreet, Smallthorne, Stoke-on-Trent, Britio. Landa Kongresa Komitato: prezidanto: Horace Barks. sekretario: R.W.Deakin. kasisto: T.C.Tasker.

### 1 - a KOMUNIKO

Superrigardo pri la planitaj aranĝoj: La kongreso estos en Stoke-on-Trent-Urbodomo, kiu situas malpli ol duona km. de la stacidomo, kaj ĝi estas la ĉefa el la ses urbodomoj en Stoke-on-Trent. En la King's Hall, la plej granda ĉambrego en la kongresejo okazos la interkonatiĝa vespero sabaton, la solena malfermo dimanĉon matene, kaj la internacia balo merkredon. La plimultaj de la manĝoj ankaŭ okazos tie. Distraj vesperoj lundon kaj ĵaŭdon estos en la Mitchell Teatro kaj la Muzeo, kiuj estas en Hanley, la mezparto de la urbego. La fakprelego okazos ĵaŭdon posttagmeze (dum la butikoj estos fermataj) en la Jubilee-Hall. Dimanĉon posttagmeze okazos ekskurso tra la duklando Cheshire, ekvidonte survoje la grandegan elektran teleskopon "Jodrell Bank", per kiu oni sekvis la Sputnikojn, kaj trapasonte la mezepokan urbon Sanbach kaj kelkajn tre vidindajn vilaĝojn. Vespermanĝo estos en Trentham Ĝardenoj, unu el la plej famaj feriejoj en la meza parto de Anglujo. Mardon posttagmeze okazos ekskurso tra la belaĵoj de la nordorienta parto de la graflando Staffordshire kaj norda parto de Derbyshire al la mineralakvejo Buxton, kie ni vespermanĝos. Poste ni revenos al Stoke laŭ la erikejoj kaj la urbeto Leek. La vendredon okazos la tuttaga ekskurso al Llandudno, tre bela apudmara feriejo en Nord Kimrujo. La trajno trapasos la feriurbo Rhyl, de kie la nova maŝino la flugpendilo (Hovercraft) trafikas trans la Dee-riverelflu-

ejon. La L.K.K. esperas ke tempo permesos rigardon al la novstilveturilo.

Gejunuloj de la fama Queensberry Lernejo, kie Esperanto estas instruata, kantos por la kongresanoj dum la semajno, kaj aliaj gejunuloj dancos naciajn dancojn dum la interkonatiĝo kaj dum la balo. La taŭgan kaj belan kongresan simbolon desegnis Leonard Brammer, tre fama loka artisto. La haveblaj hotelĉambroj estas antaŭmenditaj, sed ĝis nun nur 200 litoj estas promesitaj, kaj L.K.K. jam serĉas privatajn hejmojn por enmeti la aliajn kongresanojn. Tiuj, kiuj preferas ĉambrojn en hoteloj estas konsilataj frue aliĝi. L.K.K.

## 48-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

**SOFIO, 3-10 Aŭgusto 1963** - Sub la Alta Protektado de la Bulgara Ĉefministro Anton Jugov.
**OFICIALA KOMUNIKO N-ro 1** - Kotizoj ĝis la 31-a de decembro 1962:

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Kongresano | italaj | liroj | 6.800,- | ned. | guldenoj | 40 |
| Edz(in)o de kongresano kaj blindulo | " | " | 3.450,- | " | " | 20 |
| Junul(in)o ne pli ol 20-jara | " | " | 2.600,- | " | " | 15 |
| Student(in)o de 20 ĝis 30-jara | " | " | 4.300,- | " | " | 25 |

Gvidanto de blindulo rajtas ne pagi la aliĝkotizon. Individua membro de U.E.A. (t.e. ricevis minimume la Jarlibron) pagas £.5.950 (35 gld.) kaj ties edz(in)o £.3.000 (17,50 gld.).

Atentu! La ĉefa administrado de la Kongreso estas prizorgata en la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Tie alvenas la aliĝiloj por la kongreso kaj ĉiuj kotizoj. Ankaŭ la korespondado estu adresata al tiu ĉi adreso. Kompreneble la italoj povas peti aliĝilojn ankaŭ al Itala Esperanto-Federacio, via Po 7, Torino.

Grave! Oni atentigas ke la aliĝiloj ne klare skribitaj ne estos traktitaj. La sumoj devas esti skribitaj sur la aliĝilo en nederlanda mono (guldeno) kaj ne en italaj liroj.

Kongresejo: La Kongresejo de la 48-a U.K. estos la Ŝtata Universitato en Sofio.

Unua Bulteno: La 8-paĝa elegante eldonita Unua Bulteno de la 48-a Universala Kongreso, kun bildoj pri Sofio, listo de Perantoj kaj provizora programo, estas senpage ricevebla, kune kun la aliĝilo, ĉe la Perantoj kaj ĉe Centra Oficejo de U.E.A.

Propaganda Sonbendo: Ekde la 15-a de novembro estas ricevebla senpage propaganda sonbendo pri la 48-a U.K. Tiu ĉi sonbendo estas farita speciale por Esperanto-Kluboj, kiuj bonvolos okazigi "kongresan vesperon" por instigi siajn anojn al partopreno en la Sofia Kongreso. Mendoj estas sendendaj al la konstanta adreso de la Kongreso.

G.G. Pompilio - Konstanta Kongresa Sekretario

## P O E Z I O

### PLUVO KAJ MEMORO

Vi plaĉas al mi
pluvo, fratino mia,
kun la bonodor' de ter'
malsekiĝinta,
kaj la de longe
malklare alvenanta
grumblo de l' tondro.
Mi pensas al pasintaj,
strangaj aferoj
kaj la memor' de juneco
sola,
tre sola
al mia menso revenas.
Kie mi estis,
en kiu domo,
en kiu ĉambro,
sur la bordo
de kiu fenestro
mi antaŭeniĝis knabeto
kaj ploris?
Gutoj de pluvo
kaj larmoj
sur mia vizaĝo
same kiel tiam . . . .

GIMELLI GIANLUIGI

## E S P E R A N T O  E N  L A  R A D I O

**RADIO ROMA - ESPERANTO FAKO** - Casella Postale 320 ROMA (Italujo)
La dissendoj okazas de h.18,55 ĝis h.19,10 (M.E.T.)- Ondlongoj: Mt. 30,90; 41,24; 50,34.
Prelegantoj marde kaj merkrede: S-ro L. Minnaja - vendrede: Prof. D-ro V. Musella.
Dissendoj en Esperanto Jaro 1962-a - Ĉiujn merkredojn: Kuriero de Esperanto.
DECEMBRO 1962-a: mardon la 4-an: Tra la literaturo - vendredon la 7-an: Mondfamaj italaj lokoj: Campi Flegrei - mardon la 11-an: Novaĵoj el Italujo - vendredon la 14-an: La pliamo de Jesuo al la blinduloj - mardon la 18-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - vendredon la 21-an: Italaj arkeologiaj urboj: Ostia Antikva - mardon la 25-an: Loterkesto - vendredon la 28-an: S.ta Klara, patronino de la radio-televido.

La Fakestro: Luigi Minnaja

# FERVOJA TEKNIKA TERMINARO

| Nomenclatura della locomotiva a vapore | Terminoj de lokomotiv-partoj |
|---|---|
| Gruppo: ECHIPAGGIO DELLA CABINA DI COMANDO | Grupo: EKIPAĴO DE LA KONDUKISTEJO |
| 83 Sostegno del passamano | Subportilo de man-stango |
| 84 Porta del forno | Fajrujo-pordo |
| 85 Sostegno per la leva di inversione marcia | Subportilo de direkt-ŝanĝo |
| 86 Leva di inversione marcia | Direkt-sraŭbo kun akcesoraĵoj |
| 87 Volano per leva di inversione | Direkt-rado |
| 88 Sostegno della leva per la manovra del piano delle griglie | Subportilo de ŝpindelo al balanc-krado |
| 89 Leva di comando valvole di scarico cilindri motori | Kondukportilo kaj manlevilo al tirilo de akvo-ellas-valvo |
| 90 Rinforzi di legno per le porte di uscita del praticabile | Ligno-fortigaĵo de kondukistejo-pordo |
| 91 Montante (pedana parte posteriore del forno) | Ŝtupoj de malantaŭa vando de fajro-kesto |
| 92 Sgabello per il macchinista | Seĝo |
| 93 Armadietto per custodia attrezzi | Iloj-kesto en la kondukistejo |
| 94 Palchetto di legno per la piattaforma | Planko de la kondukistejo |
| 95 Poggia piedi elastico | Elasta pied submetaĵo en la kondukistejo |
| 96 Rubinetto a tre vie per il riscaldamento a vapore | Trivoja krano de vaporhejtado |
| 97 Sostegno per il rubinetto s.d. | Tenilo por trivoja krano de vaporhejtado |
| 98 Sostegno per la stagnina dell'olio | Tenilo por oleoboteloj |
| 99 Vaschetta (recipiente per scaldapranzo) | Pecoj de kuir- kaj varmigilo |
| 100 Sostegno per il recipiente s.d. | Tenilo por la kuir- kaj varmigilo |
| 101 Vaschetta ingrassatrice | Ŝmirilo |
| 102 Leva di comando portella del ceneratoio | Tirstangoj al cindrujo |
| 103 Leva c.s. piano inferiore del ceneratoio | Tirstangoj al plankoklapo de cindrujo |
| 104 Portina di risciacquamento | Lavad-luko kun fungo |
| Gruppo: ACCESSORI | Grupo: FRAMO KAJ AKCESORAĴOJ |
| 1 Cassa trazione | Kuplo kesto |
| 2 Alloggiamento caviglia barra di trazione | Lagro por ĉef-kuplo-bolto |
| 3 Alloggiamento caviglia barra di riserva | Lagro por danĝero-kuplo-bolto |
| 4 Spinotto principale della barra di trazione | Ĉefkuplobolto |
| 5 Caviglia (spinotto) per barra di riserva | Danĝero kuplobolto |
| 6 Barra di trazione | Ĉef-kuplo-trabo |
| 7 Barra di riserva | Danĝero-kuplo-trabo |
| 8 Piastra controrespingente fra loc. e tender | Bufro-plato |
| 9 Tenditore di riserva fra loc. e tender | Kunstreĉilo |
| 10 Ribalta principale | Granda tendro-lado-ponto |
| 11 Ribalta secondaria | Malgranda tendro-lado-ponto |
| 12 Sostegno per fissare la ribalta | Tenilo por la lado-ponto |
| 13 Montatoio a scaletta per la cabina comando | Ŝtupo je la kuplo-kesto |
| 14 Gradini della scaletta s.d. | Ŝtupoj je la kondukistejo |
| 15 Bilanciere di sospensione | Laŭlonga balanc-levilo kaj suportilo |
| 16 Arresto del bilanciere | Mov-limigilo por balanc-levilo |
| 17 Appoggio della caldaia | Krampoj de la kaldron-subtenilo |
| 18 Ceneratoio | Cindrujo |
| 19 Portella anteriore del ceneratoio | Antaŭa cindrujo-klapo |
| 20 Portella posteriore del ceneratoio | Malantaŭa cindrujo-klapo |
| 21 Asta di manovra del ceneratoio | Tirstango al cindrujo |
| 22 Foro per la pulizia del ceneratoio | Enpuŝ-truo |
| 23 Rete metallica per impedire l'uscita della brace dal ceneratoio | Flugcindro-retenilo de cindrujo |
| 24 Botola per visita al ceneratoio | Homtruo en la cindrujo planko |
| 25 Portella del piano inferiore del ceneratoio | Planko-klapo de cindrujo |

| | | |
|---|---|---|
| 26 | Asta di manovra portella s.d. | Tirstango de planko-klapo de cindrujo |
| 27 | Tubo bagna ceneratoio | Akvo-ŝprucig-tubo en la cindrujo |
| 28 | Molla di sospensione a balestra | Pendig-risorto |
| 29 | Staffa per molla di sospensione a balestra | Risort-ligilo |
| 30 | Attacco fra boccola e molla di sospensione | Pendigilo por risorto |
| 31 | Foglia della molla a balestra | Aldonpeso de risorto |
| 32 | Zeppa per fissare le foglie della molla a b. | Kejlo de risorto |
| 33 | Tirante (pendino) della molla di sospensione | Streĉ-ŝraŭbo de risorto |
| 34 | Supporto per tirante della molla di sosp. | Subportilo por streĉ-ŝraŭbo de risorto |
| 35 | Riparella oscillante per tirante s.d. | Selo-plateto |
| 36 | Piastrina per l'estremità della molla a bal. | Prem-plateto de risorto |
| 37 | Cuscinetto dell'asse accoppiante | Aks-lagro (kuplo-akso) |
| 38 | Cuscinetto come sopra (tipo obergethmann) | Aks-lagro (tipo obergethmann) |
| 39 | Coperchio della vaschetta di ungimento | Formilo de aks-lagro |
| 40 | Boccola | Aks-lagro-kesto |
| 41 | Spessori di guida della boccola (piastre di guardia) | Glit-plato de aks-lagro |
| 42 | Carcassa (cuscinetto) con metallo antifrizione | Aks-lagro (kun lagro-metalo) |
| 43 | Sottoboccola | Subkesto de aks-lagrujo |
| 44 | Guancialetto di lana | Lubrika tampono |
| 45 | Cuscinetto della boccola, parte superiore | Supra aks-lagro |
| 46 | Cuscinetto della boccola, parte inferiore | Malsupra aks-lagro |
| 47 | Cuneo di correzione | Lok-kejlo de aks-lagro |
| 48 | Vite di registrazione cuneo s.d. | Lok-kejl-ŝraŭbo de aks-lagro |
| 49 | Parasala | Flanka ŝovilo de aks-lagro |
| 50 | Traversino di collegamento del parasala | Kunigilo de aperturo por aks-lagro |
| 51 | Sala | Rad-grupo (ĉiuj radoj) |
| 52 | Sala motrice | Mov-radakso |
| 53 | Sala accoppiata | Kuplo-radakso |
| 54 | Sala portante | Port-radakso |
| 55 | Sala a gomito | Kurbigita rad-akso |
| 56 | Sala montata motrice | Mov-rado (kompleta) |
| 57 | Sala montata accoppiata | Kuplo-rado (kompleta) |
| 58 | Sala montata portante | Port-rado |
| 59 | Mozzo dell'asse | Mov-rado sen pivoloj |
| 60 | Fusello della sala | Moviĝ-faco de akso |
| 61 | Cerchione della ruota | Rad-ringo (aŭ ringego) |
| 62 | Corona dei raggi della ruota dove si innesta il mozzo dell'asse | Rad-korpo |
| 63 | Anello di bloccaggio | Ringo-agrafo |
| 64 | Contrappeso della ruota | Kontraŭ-peco |
| 65 | Perno di manovella dell'asse motore | Mov-pivoto |
| 66 | Contromanovella dell'asse motore | Kontraŭ-kranko |
| 67 | Perno di manovella biella accoppiata | Kuplo-pivoto |
| 68 | Sostegno della guida parallela per testa crociata | Subportilo por glit-trabo |
| 69 | Traversa di collegamento del telaio anteriormente all'asse motore | Fran-kunig-peco antaŭ la movado |
| 70 | Sostegno per il cilindro del freno | Fran-kunig peco je la brems-cilindro |
| 71 | Traversa di collegamento telaio posteriormente alla prima sala accoppiata | Fran-kunig peco malantaŭ la unua kuplo-akso |
| 72 | Come sopra | Kiel supre |
| 73 | Come sopra | Fran-kunig peco por lagro de boĝio kaj biselo |
| 74 | Castello dei cilindri | Fran-kunig peco inter la cilindroj |
| 75 | Traversa di collegamento orizzontale del telaio | Horizontala supra fran-kunig-peco |
| 76 | Come sopra | Horizontala malsupra fran-kunig-peco |
| 77 | Traversa di collegamento tra le parti anteriori del focolaio | Fran-kunig-peco antaŭ la fajro-kesto |
| 78 | Trave di appoggio | Fran-apogilo |